Esperanto-Lingva Konversacia Rondo de Losanĝeleso
Diskuto-Temo por Februaro 2004

Recenzoj

preparis Leston Buell

1. Demandoj

1. Ekspliku en Esperanto kio estas recenzo.
2. Ĉu vi legas recenzojn por elekti inter filmoj aŭ nacilingvaj libroj? Kie vi trovas tiujn recenzojn?
3. Troviĝas recenzoj ne nur por filmoj kaj libroj, sed ankaŭ por aliaj aferoj. Kiuj aliaj specoj de recenzoj ekzistas kaj kiajn vi mem uzas?
4. Ĉu vi iam trovis, ke vi tre malsamopinias kun recenzisto?
5. Kiel vi decidas, ĉu la recenzo estas fidinda?
6. Ĉu vi legas kaj utiligas recenzojn pri Esperantaĵoj? Kie vi trovas tiujn recenzojn?
7. Ĉu plaĉus al vi esti recenzisto de restoracioj? De kino? De libroj? Kiu el tiuj ŝajnas al vi esti la plej facila? La plej malfacila?
8. Krom recenzojn, kio helpas al vi elekti inter diversaj filmoj kaj libroj?
9. Prezentu al la rondo recenzon de legata de vi libro aŭ de vidata de vi filmo. Por fari tion, estas konsilinde prepari listeton de la ideoj, kiujn vi prezentos. Eblas, ke vi bezonos ankaŭ vortojn, kiujn vi devos serĉi en la vortaro antaŭ ol prezenti la recenzon. Ne forgesu prezenti iom pri la rakonto de la filmo aŭ la enhavo de la libro.

2. Utilaj Vortoj

laŭdi

malllaŭdi

kritiki

fuŝi, fuŝa

misa

ĵurnalo, revuo, gazeto

preseraro

3. Ekzercoj

Ekzerco 1. Ŝanĝu la frazojn, laŭ la unua.

1. Mi konsilas, ke vi *faru* tiun aferon.
   Tio estas *farinda* afero.
2. Estus bona ideo *legi* tiun artikolon.
   Tiu artikolo estas _____ .
3. Oni devus *eviti* tian situacion.
   Tia situacio estas _____ .
4. Oni ne *konsilas* al ni vojaĝi al tiu lando dum la nuna milito.
   Ne estas _____ vojaĝi al tiu lando dum la nuna milito.
5. Mi tre rekomendas al vi *vidi* tiun spektaklon.
   Tiu spektaklo estas tre _____ .
6. Oni devus *laŭdi* tian sintenon.
   Tia sinteno estas _____ .
7. Oni devus *miri* tiun grandiozan konstruaĵon.
   Tiu grandioza konstruaĵo estas _____ .

Ekzerco 2.

1. La Muzeo Getty estas unu el la ĉefaj aferoj, kiujn turistoj devus *vidi* en nia urbo.
   La Muzeo Getty estas unu el la ĉefaj *vidindaĵoj* de nia urbo.
2. La bibliotekistino donis al mi listeton de aferoj, kiujn oni devus *legi*.
   La bibliotekistino donis al mi listeton de _____ .
3. Li nova koncertejo vere meritus vian *viziton*.
   La nova koncertejo estas vera _____ .
4. La milito estas afero, kiun oni vere devus *eviti*.
   La milito estas vera _____ .
5. Mi sugestas, ke vi tute *forgesu* tiun aferon.
   Tio estas _____ .
6. Oni devas *miri* la belecon de tiu montego.
   La beleco de tiu montego estas vera _____ .

4. Lingvaj Rimarkoj

Revuo, gazeto, ĵurnalo, magazino, bulteno.

Laŭ PIV, *revuo* estas « perioda, sufiĉe ampleksa presaĵo, speciale dediĉita al unu fako: *la Internacia Scienca Revuo ».*

Gazeto ŝajnas esti la plej ĝenerala vorto « ...*ĉiutaga gazeto* (ĵurnalo); *semajna, dusemajna, monata, dumonata gazeto* (=magazino, revuo) ».

Ĵurnalo estas ĉiutaga gazeto.

Magazino estas « perioda vulgariga revuo, ordinare ilustrita kaj enhavanta artikolojn pri tre diversaj temoj ».

Bulteno estas « perioda, ne ĉiam regule aperanta informilo aŭ de ŝtato, aŭ de societo, aŭ de fakuloj ».